Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 5-a de Januaro 2021

(zom-kunveno)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

Gastoj: (partatempe) David Dvir-Dotan, Avi k.a.

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

1. Raportoj

a) Nova adepto – (ankoraŭ ne paganta membro): Nican Cvi Kohen. Lia avino forpasis – indas jam mencii en IE-170, en la rubriko "Forpasoj".
b) Amos trovis multe da poŝtaĵoj en nia poŝtkesto (vidu sube en par.6).

2. Tasko-dividoj (Jehoŝua)

Eran tre malofte partoprenas la estrar-kunsidojn – konsiderinda! Matilda ne sufiĉe kapablas partopreni, ankaŭ ŝia nova komputilo ankoraŭ ne funkcias plene. ***Propono***: Jehoŝua telefonos al Matilda - ĉu ŝi akceptas esti Honora Membro de ELI (kaj rezigni esti en la Estraro). Krom tiuj du anoj – ĉiuj daŭrigu siajn taskojn.

3. Oficejo (Amri)

a) Estis urĝa kunsideto la 22-an de Decembro 2020, ĉeestis 5 estraranoj. **Amri** prezentis impresojn de siaj vizitoj al la tri oficejoj prezentitaj en la antaŭa mesaĝo: ***Bejt-El-Al*** (Ben-Jehuda-str. 32) kaj du en ***Migdal-Alon*** (94 Jigal-Alon-strato), etaĝoj 11 kaj 19. Amri argumentis, ke nun estas taŭga tempo aĉeti (kondiĉe ke ni sukcesos draste malaltigi la prezojn), ĉar post la fino de la koronvirusa krizo, la prezoj realtiĝos. Eran (konsultite) diris ke nun la luprezoj estas ege malaltaj kaj proporcie tiel devus esti ankaŭ la vendoprezoj. Amri informis ke la vendoprezoj ne tiom multe falis kiel la luprezoj: el 6 similaj oficejoj venditaj en Tel-Aviv dum la lasta jarduono la averaĝa prezo estis 22-25 mil /m^2, simile al la petataj de ni prezoj ĉe la 3 oficejoj.
Ŝlomo finkalkulis la totalajn prezojn (inkl. VAT k aldonajn kostojn) de la tri oficejoj – ELI havas la bezonatan sumon. Amri malrekomendis la oficejon en ***Bejt-El-Al*** pro ĝia malnoveco (1955) kaj juraj problemoj rilataj al konservado-plano. Li favoris la oficejon sur 19 et. ĉe Alon-str., ĉar ĝi estas iomete pli granda, havas fenestron – tial eblus ricevi pli altan lupagon; sametaĝe troviĝas kunvenejo por ĉ. 10 personoj, kiun ni rajtus uzi senpage. Ŝajne ankaŭ la negoca marĝeno estus tie pli granda. ***Decido***: Amri eknegocu paralele kun la perantoj de ambaŭ oficejoj en ***Migdal-Alon***, per starta oferto de minus 20% kaj postulo pri garantio. Laŭbezone

2/…

Eran helpu negoci kiel “la malbona policano”.

Nuna stato: Amri eknegocis kun la perantino de la oficejo ĉe la etaĝo 19 (94 Alon-strato) kaj ofertis 270,000 NIS (minus 23%). Li diris, ke se eblos garantio pri ne-luado, ni povos iomete plialtigi la prezon. La perantino respondis, ke tia garantio tute ne eblas, sed eblas eviti la pagon de la urba imposto (*arnona*) dum jarduono, se la oficejo ne estas uzata. Ŝi poste revenis kun la lasta oferto de la posedanto pri 300,000 NIS, sed postnelonge rekontaktis korektante la prezon al 320(!) mil. Pro la tro alta prezo, pro la malgrandeco de la kunvenejo k.a. – Amri rezignis kaj vizitis la alian oficejon samloke. Ĝi kostas iom malpli, sed estas senfenestra, kun la sama eta kunvenejo. Ni rezignas pri ambaŭ! Antaŭe Amri vizitis la oficejon (18 m^2) ĉe 75 Hercl-strato en Ramat-Gan (“Oazis-domo”), kiu ŝajne tre taŭgis pro siaj kondiĉoj. Sed – laŭ la esploro de adv. Modan, kaj laŭ la informoj aŭdeblaj en la domo kaj ĉirkaŭe – la oficejoj tie, miksite kun loĝejoj, havas tro malbonan reputacion kaj multaj luantoj forkuras de tie. Amri diskutis kun la makleristo Matan, kaj rezignis - en la nomo de ELI - ankaŭ pri tiu ĉi ebleco.
Amri daŭrigis al du aliaj proponoj: Bnej-Brak – tie la makleristo konvinkis lin, ke la loko ne taŭgas por niaj celoj, sed proponis alian en Riŝon-Lecijon kaj plian en Tel-Aviv, strato Hamered, proksime al la iama trajnstacio.
Provizore Amri ĉesos la serĉadon – ni ja kapablas pruvi al la Registristo, ke ni provis.

4. <u>Israela Kongreso 2021</u> (Amri)

Ĉu eble en Majo? Aŭ en Oktobro? **Amri**: ni ankoraŭ ne devas decidi. Ni bezonos unu monaton antaŭe por organizi. Eble pli taŭgos en Oktobro 2021 (pro la pandemio kaj la eksterlandanoj), kaj ankaŭ en Aprilo 2022.

5. <u>Dratverejo</u> (Jehoŝua)

Post la vizito de Jehoŝua ĉe la luanto, Dima Nemirovski, en la hospitalo “Iĥilov”, la 30-an de Novembro, - ne estis plu kontaktoj kun Amos aŭ kun ni. Dima kaj Marina – kiu daŭre loĝas en la loĝejo kun la infanoj kaj eble kun la patrino de Marina – ne respondas niajn telefonvokojn. Ili loĝas fakte senpage (ni eĉ ne ricevis la pagon por la lastaj du monatoj). Jehoŝua telefonos al Avraham, la dom-komitatano, petante meti leteron ĉe la pordo, en kiu ni postulos tujan telefon-reagon, pagon dum difinita tempo kaj minacos per evikcio.

6. <u>*Israela Esperantisto* n-ro 170</u> (Mikaelo)

a) Estos du variantoj: kolora, kaj nigra-blanka.
b) Jehoŝua sendos ĝidatigitajn adreslistojn al Mikaelo.
c) Amos trovis en nia poŝtkesto revenintan poŝton, interalie IE169 el eksterlando kaj Israelo. (kelkloke ĉesis la poŝtaj servoj pro la kvaranteno, kaj kelkaj el la adresoj ne validas).

3/…

ĉ) Gabi esploros kaj precizigos la liston de niaj funebrantaj anoj, kaj sendos al Mikaelo.
d) Kiam aperu IE n-ro 171? Ĉu la 15-an de Aprilo? Aŭ la 1-an de Majo? Amri jam havas kvar pecojn de materialo.

7. <u>Kotizoj</u> (Jehoŝua)
a) Jehoŝua informos ĉiujn, kiom ili devos pagi, kaj kiel. La Baza Membreco por UEA kostos 27 eŭrojn, ĉar dank' al la klopodoj de Amri Israelo estis transigita de la 5-a al la 4-a kategorio. La kotizo por ELI restas 100 sikloj.
b) **Propono**: dum la Ĝenerala Kunveno en la venonta Zamenhofa Vespero ni altigu la kotizon ekde 2022 al 120 sikloj – post la aprobo de la membraro. La strukturo de la rabatoj restu proporcia, ni prilaboru la detalojn.
c) Ŝlomo komparu sian kotiz-konton kun Jehoŝua.

La venonta kunsido: la 2-an de Februaro, 2021, je la 20h00 (*zom-kunveno*)

Protokolis: Gabi Zeevi

<u>Eksterordinaraj Estrar-kunsidoj</u> (pri la problemoj en la Dratverejo)

a) La Estraro zom-kunsidis la 12-an de Januaro. **Partoprenis**: Jehoŝua, Mikaelo, Ŝlomo, Amri, Gabi (Gasto: Jinon Meiri).
Jehoŝua: la luanto, DimaNemirovski, kuŝas konstante en hospitalo, ne kapablas pagi. Lia kunulino, Marina Bajtman, ricevis nian averton, kaj parolis telefone kun Jehoŝua. Ŝi diris, ke ŝi ne plu havas la ŝparitan por ni dumonatan pagon, ĉar ŝi devis uzi ĝin por sia vivteno. Ŝi krome informis, ke ŝia frato emas helpi ŝin pri la pagoj, kaj ke li telefonos la venontan tagon al Jehoŝua por pritrakti la problemon. La Estraro decidis atendi la rezulton.

b) La Estraro zom-kunsidis la 19-an de Januaro. **Partoprenis**: Jehoŝua, Ŝlomo, Amri, Gabi (Gasto: Jinon Meiri).
Jehoŝua: la frato de Marina ne kontaktis nin, sed Amos informis, ke Marina intencas pagi al li fine de la monato. Intertempe Ludmila, la patrino de Marina, proprainiciate kontaktis kun Jehoŝua. Ŝi diris, ke ĉar ŝia luado finiĝis en alia loko, ŝi intencas ekloĝi kun sia filino en nia loĝejo kaj pagi ĉiumonate **per konstanta banka instrukcio** la 3,100-siklan lupagon, plus 2,000 siklojn por malgrandigi po iome la akumulitan ŝuldon – entute 5,100 siklojn monate. Ŝi povos komenci ne antaŭ la 12-a de Februaro. **Decido**: *ni atendu la venontajn 3 semajnojn, kaj se la pagoj ne ordiĝos, ni komencos la evikcian proceson.*

4/…

Avraham, la domkomitatano, informis nin, ke unu el la loĝantoj, ekspolicano, kiu jam plendis pri la damaĝo kaŭzita de la stato de la akvotuboj en nia loĝejo, invitis la inspektistojn de la urbestraro de Bat-Jam por montri la damaĝojn en la bomb-ŝirmejo kaj la ŝtuparejo; ili trovis tie la akvospurojn. La riparo de la damaĝoj estas urĝe bezonata. Tubisto el la Asekur-kompanio venis taksi la laboron – espereble li venos senprokraste ripari. La ŝlosilo de la loĝejo estas ĉe Avraham. Morgaŭ Ŝlomo parolos kun la oficistino de la asekur-kompanio. Intertempe Marina kun la gefiloj kaj la patrino ne povos reveni al la loĝejo, ĉar ĝia ĉefa krano estis fermita niapete far Avraham pro la likanta akvo; ni devos informi ilin post la fino de la riparoj. Se ni mem iniciatus la ŝanĝon de la tubaro, tio kostus al ni ĉ. 9,500 siklojn.

Tute aparte: Amri informis pri siaj serĉoj de pliaj oficejoj kun kunvenejoj, kiuj kostus 2/3 de la pago, kiun ni pagas nun al WIZO. Li ne trovis – sed ni almenaŭ povas pruvi niajn klopodojn.